ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 1

JANUARO 2014 Kol. 345/30

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Al nova jaro, Temo de UK en Bonaero, Rubika ĵetkubo, Ronda jubileo, E-Silvestro en ČT, Invito al Grésillon, KISO, UK de idistoj, Tristaj anoncoj

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Sur la sojlo de la nova jaro 2014,

karaj kaj estimataj gesamideanoj, akceptu miajn plej korajn salutojn kaj bondezirojn. Mi deziras al vi nur bonajn mesaĝojn, ke Vi havu tiajn geamikojn, kiuj konsilos al Vi en kazo de neceso - kaj en tristo per afabla mano karesos Vin. Multe da sano: kio doloras, tio baldaŭ resaniĝu. Multe da amo, ĉar ĝi en la mondo sufiĉe mankas. Ke Vi povu ĝoji pri belaĵoj de la mondo.

En la pasinta jaro ni kuraĝis vojaĝi dum tri tagoj al la germana urbo Herzberg, kiu jam kelkajn jarojn havas sian duan nomon "Esperanto-urbo". Nunjare ni volus esti pli modestaj – organizi nur unutagan renkontiĝon en Pardubice. "La 18-a Esperanto-tago" okazos la 14-an de junio 2014. Pri la programo kaj detalaĵoj Vi povos legi en venontaj Informiloj.

Longe ni laboris pri novaj interretaj "webaj" paĝoj. Nun mi opinias, ke ili estas preskaŭ pretaj kaj Vi povus rigardi ilin.
La ligilo estas: www.esperanto-aeh.eu
Ni ĝojos, se Vi skribos, ĉu la paĝaro plaĉas al Vi, aŭ kion Vi volus ankoraŭ ĉi tie trovi. Tie Vi povos trovi ankaŭ la arkivon de Informiloj, sed nur kun duonjara malfruiĝo.

Certe Vi scias, ke venontjare okazos la centa Universala kongreso en la-nordfranca urbo Lillo. Ni planas denove organizi busvojaĝon kaj esperas, ke ĝi estos tiel sukcesa, kiel al Montpeliero, Zagrebo, Vilno aŭ Bjalistoko.

Nia Esperanto-klubo d-ro Schulhof kaj AEH posedas jam multajn kronikojn kaj fotoalbumojn pri sia agado. S-ano J. Hron jam ĉiujn kronikojn fotis kaj por la interesatoj ili estos sur kompaktdisko.

S-anino J. Rýznarová kompilas kaj tradukas el kelkaj fontoj la broŝuron (libreton) en la ĉeĥa lingvo pri F. V. Lorenz, kiu konis 104 lingvojn. Li estis la unua ĉeĥa esperantisto, kiu eldonis "La unuan lernolibron de Esperanto por ĉeĥoj". Plimulton de sia vivo li travivis en Brazilo, kie li ĝis nun estas agnoskata kiel la plej granda lingvisto. Nia asocio eldonos la broŝuron proprakoste. Ni esperas, ke printempe ĝi estos preta.

Dufoje jare estas organizataj lingvaj seminarioj en Skokovy. Por ĝia regula organizado ni tre dankas al s-anino Jindřiška Drahotová. Printempe jam estos la 39-a seminario kaj estus bezona pligranda partoprenantaro, ĉar ĝia nombro ĉiujare malgrandiĝas. Ni planas ŝanĝi la lokon almenaŭ por unu aranĝo aŭtune (tamen ne malproksime de Skokovy), ke estu eblo ekkoni alian ĉirkaŭaĵon..

Mi volus ankaŭ danki al ĉiuj, kiuj sendadas interesajn artikolojn al nia gazeto. Vi nun eklegas la 345-an numeron, kiun AEH eldonas jam la 30-an jaron; mi volas danki ankaŭ al ĉiuj pluaj helpantoj el la redakcia stabo, el la komitato, kaj ĉefe al la kvar lingvaj korektantoj, kiuj klopodas nian gazeton gramatike kaj stile plibonigi.
Same mi dankas por helpo al Líba Filipová pri surbendigo de Informiloj por blinda esperantisto en Kanado kaj al Zdenka Novotná pro tradukoj de Informilo al la ĉeĥa lingvo por bibliotekoj.

Al Vi ĉiuj mi deziras multe da sano, feliĉo, kontento, sukceso kaj pluan elanon en la nova jaro 2014.

Lenka Angelová

Kongresa temo de UK en Bonaero: "Ĉu la nepoj nin benos?"

Laŭ decido de la Estraro de UEA, la 99-a Universala Kongreso en Bonaero, Argentino, traktos la temon "Ĉu la nepoj nin benos?" Streboj al Daŭripova estonteco. Interalie, tiu temo markos la finon de la Monda Jardeko de Edukado por Daŭripova Evoluo (2005-2014), sub aŭspicio de Unesko.
Ni esperantistoj ja laboras por la nepoj, t.e. por la venontaj generacioj, laŭ la vortoj de Zamenhof en "La vojo", komentas d-ro Mark Fettes, la prezidanto de UEA. Sed niaj nepoj vivos en monda socio, kiu devas solvi multe pli da problemoj, ol nur la lingvan. Esplori la ligojn inter tiuj streboj kaj la nia, tio estas la celo de la tema programo.
Kerne en la koncepto de daŭripova evoluo troviĝas la konservado de kultura kaj lingva diverseco, akompane al la biologia-ekologia diverseco. Tiu aspekto de la kongresa temo certe ricevos atenton en Bonaero, kie eblos kleriĝi pri streboj konservi indiĝenajn lingvojn, pri plurlingvaj lernejoj kaj simile. Fettes tamen akcentas, ke la temo traktos pli vastan terenon.
Tradicie, oni parolas pri "tri kolonoj" de Daŭripova evoluo: la ekonomio, la socio kaj la naturo. Ni zorgos, ke la temkunsidoj donu atenton al ĉiuj tiuj kampoj. Per tio ni celas ne nur klerigi nin pri aktualaj mondaj evoluoj kaj alternativoj, sed ankaŭ aktualigi nian idearon. El la kongresaj debatoj, laŭ mia espero, povus veni novaj respondoj al la demando: pro kio Esperanto?

[Gazetara komuniko de UEA]

Rubika ĵetkubo

En la kadro de hungara majstreco en kompilado de Rubika ĵetkubo prezentis la organizaĵo Rubik Enterprises novan modelon de la fama cerbumilo por nevidantoj.
La ĵetkubon kun dimensio 3x3x3cm nevidantoj povas kompili danke al elstaraĵoj. La firmao ankaŭ prezentis ĵetkubon en plibonigita mekanismo de turnado, kiu faros la kompiladon de cerbumilo ankoraŭ pli komforta. La agentejo AP citas la ĉefon de la firmao János Kovács, ke ili promesas al tiuj ĉi novaĵoj avantaĝon kontraŭ konkurenco kaj eblon, kiel forigi ĉinajn kopiojn el la merkato.



La hungara inventisto Erné Rubik konstruis la cerbumilon en la jaro 1974. En la jaro 1980 la ĵetkubo fariĝis sukcesa novaĵo kaj akiris aprezon "Ludilo de la jaro". Post unu jaro en Munkeno okazis la unua majstreco en kompilado de la ĵetkuboj. La tiama venkanto kompilis ĵetkubon en 38 sekundoj. En la monda majstreco en la jaro 1982 en Budapesto la venka tempo estis 22,95 sekundoj. Nuntempe la oficiala monda rekorda tempo estas 5,55 sekundoj.

El la gazeto "Můžeš" tradukis Jarmila Rýznarová

Ronda jubileo

Antaŭ unu jaro festis sian rondan jubileon la konata slovaka esperantisto Stano Marček. Li naskiĝis 5. 1. 1953 en Slovakio. En sia junaĝo li aktivis en la slovaka E-movado kaj gvidis multajn kursojn de Esperanto. Li famiĝis kiel multjara redaktoro de la revuo *Esperanto*, organo de UEA. La redaktejo situis en la urbo Martin Slovakio (de 2002 ĝis 2013). Antaŭe li estis redaktoro de la revuoj *Esperantisto Slovaka*, *Esperantista Vegetarano kaj* dum du jaroj *Heroldo de Esperanto.* Li kunlaboris ankaŭ kun la magazeno *Monato*. *Heroldo de Esperanto* estas la plej longe eldonata semajna periodaĵo en lingvo Esperanto. En la jaro 1920 fondis ĝin Th. Jung en la germana urbo Kolonjo ĉe Rejno.

Stano Marček verkis librojn (interalie proprajn kolektojn de krucvortenigmoj), nuntempe li mem eldonas la lernolibron „Esperanto per rekta metodo“, kiu aperis en multaj tradukoj. La rekta metodo de instruado estas kreata surbaze de la instruata lingvo, do oni ne bezonas la gepatran. La lingvan vortprovizon oni instruas helpe de bildetoj, aĵoj, pere de mimiko, gestoj ktp. Abstraktajn vortojn per kunmetado de konceptoj kaj pensoj. La gramatikon oni enkondukas per la kapablo instigi la lernantojn esprimi ideojn laŭ modelaj ekzemploj. La metodon li perfektigis kaj aplikas jam en trideko da tradukoj. La lernolibron akompanas didaktikaj materialoj: Kompakt-diskoj kun modela elparolo de Esperanto.

Menciindas ankaŭ, ke en la 1980aj kaj 1990aj jaroj li laboris kiel manaĝero de vigla ĉeĥoslovaka rokmuzika grupo "Team", kiu post granda sukceso de la unua albumo kantis ĉion en Esperanto. Tio ebligis al ili sukcesi eksterlande, ekzemple en Britio kaj koncerti dum diversaj esperantistaj prezentadoj. Ek de 2010 li estas prezidanto de SKEF (Slovaka E-Federacio) kaj nuntempe li redaktas pluajn periodaĵojn. (Ĉerpita el E-Vikipedio kaj retaj dokumentaroj).

Okaze de lia naskiĝdatreveno (kvankam malfrue), mi permesas gratuli al li kaj deziri pluajn sukcesojn en poresperanta laboro kaj por tio bezonatajn sanon, feliĉon kaj kontenton.

Stanislav Štefan

Denove ni adiaŭis malnovan jaron en la urbo Česká Třebová

E-Silvestro en Česká Třebová estas jam tre konata. Certe pli ol 30 foje renkontiĝis tie esperantistoj el ĉiuj regionoj de Ĉeĥa respubliko.
La 28-an de decembro tien venis nur 45 esperantistoj el 15 lokoj de nia lando kaj unu nederlandanino Gerry. La nunjara kvizo estis plej malfacila, en kiu estis sufiĉe da nekonataj vortoj el la malnova ĉeĥa lingvo aŭ el la regionaj ĵargonoj. La ĉefa temo de la tuta renkontiĝo estis: Nutrado de la ŝtonepoko ĝis la hodiaŭa tempo. Nunjare prezentiĝis pli da grupetoj ol unuopuloj. Jen, kio estis publikigita en la ĵurnalo "Orlické noviny": La grupo de Pardubice surprizis per nutrado de la ŝtona epoko ĝis en malproksima estonteco. Ili preparis mamuton, kolektis arbarajn fruktojn, venis eĉ ĉasisto

kun sia granda hundo. Kion ni manĝos estontece? Ni ne bezonos manĝon kiel hodiaŭ; ni gustumis ion similan kiel aspiko, "amarouny". Tamen mielon kaj trinkmielon ni uzos plu.

Pluaj grupoj montris manĝojn de niaj avinoj kaj praavinoj, ankaŭ ceteraj partoprenantoj ilin gustumis kaj subite servistinoj alportis flaneton, kiu ĉeĥe nomiĝas "jabkance". Ĝi estas specialaĵo de la urbo Česká Třebová. Kaj la organizantoj estis malagrable surprizitaj, ĉar ili volis unue pri tiu manĝo el terpomoj paroli, mallongan videon projekcii kaj nur poste proponi, ke la homoj divenu, kion ili havas sur la teleretoj. Do, la "surprizo" estis sur la teleroj neatendite frue. Ne gravas. Tamen ĝi bone gustis.

Interesa estis marŝo de Třebovanoj kun kuiristaj ĉapoj kaj antaŭtukoj kun kuiriloj, kiuj kun kanto bonvenigis la novan jaron 2014. Kaj multe da donacetoj, dancoj kun kantoj, ankaŭ dancaj ludoj, kredu, pli bone ni ne povis adiaŭi la malnovan jaron kaj bonvenigi la novan!

J. Rýznarová

Invito al printempa Grésillon

Invito al **PRINTEMPaS**, intensivaj kursoj kun Radojica Petrović kaj Christophe Chazarein kaj internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1).

De la 26a de aprilo ĝis la 4a de majo 2014 en la franca Esperanto-kastelo Greziljono.
Retejo: http://gresillon.org/printempo
Kontakto: kastelo@gresillon.org, +33-2.41.89.10.34, Maison Culturelle de l'Espéranto, Grésillon, St. Martin d'Arcé, 49150 BAUGÉ, France.

Kion signifas la vorto K I S O ?

Ne tion, kion vi opinias. Sed ĝi estas:
Kafoklaĉa **I**nternacia **S**omera **R**enkontiĝo

Marburga Esperanto-Grupo, Afföllerstr.19, D – 35039 Marburg/Lahn (retpoŝte:kiso@esperanto.de) invitas vin al la fame konata Kafoklaĉa Internacia Somera renkontiĝO = KISO.

Ĝi okazos jam la 24-an fojon de la 10-a ĝis la 17-a de aŭgusto 2014 por "ludi, krei, sperti vin mem", en la Naturamika Domo "Steinkautenhütte", kiu situas en la arbaro proksime al la urbo. Aliĝu antaŭ la 15-a de junio, skribu por la flugfolio kaj la aliĝilo.

Kion prezentas la foto ?

Interesa mesaĝo en la fejsbuka grupo "Esperanto":

"Kion prezentas la foto?

Ĉu partoprenantojn de eta Esperanto-ekskurso?

Ĉu malgrandan Esperanto-klubon en iu eta vilaĝo?
Ne.

Temas pri ĉiuj (!) partoprenantoj de "Universala Kongreso" de idistoj en la jaro 2013."

L.Szilvási

Pliaj informoj pri ido: http://www.ido.li/index.php/ULI/Ouroux2013

Tristaj anoncoj :

Nia multjara membrino Anna Picková el Hlinsko v Čechách forpasis en la aĝo de 98 jaroj. Ŝi mortis la 14-an de decembro 2013. La komitato de AEH kondolencis la familianojn. En la junia Informilo estis pri ŝi longa artikolo kun la foto. Honoron al ŝia memoro.

En la sekva tago la 15. 12. 2013 forpasis la fama germana personulo, la esperantisto Helmar Frank ,* *19. 2. 1933 – † 15. 12. 2013.*

Profesoro Helmar Frank inter esperantistoj estas plej vaste konata kiel la iniciatinto, fonda prezidanto kaj multjara motoro de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS). Tio certe estas lia tre grava merito, sed necesas ankaŭ rememori, kiel enhavriĉan kaj rezultoplenan vivon li havis en pluraj fakoj:

Li estis sendube pioniro de la informadika psikologio kaj fronta reprezentanto de kibernetika pedagogio, ene de kiu li intense okupiĝis inter aliaj problemoj pri lingvo-orientada instruado de Esperanto. Li estis ankaŭ kunfondinto de la Eŭropa Klubo, kiu okupiĝas pri neŭtrala lingva politiko; politike engaĝiĝinta liberalulo, portanto de la Meritkruco de la Germana Federacia Respubliko; kaj honora profesoro de pluraj universitatoj en Eŭropo, Azio kaj Ameriko. Honoron al lia memoro.

Petr Chrdle kaj red.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Kosnar, J. Rýznarová, L. Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh-ikeh@volny.cz** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo= 200,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €. Kodo ĉe UEA : aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.